



Enhavtabelo	Paĝoj	Kulturo pri relo : libro
En nia librokroniko, ni prezentas libron, kies aŭtoro estas sperta trajnokondukisto ; li malkovrigas al ni sian profesion, aldonante poetan dimension al sia verko. Se vi serĉas apartan libron, ne hezitu, komencu la legadon de tiu neordinara verko.	1	Romano : Mattia Filice, verkisto naskita el la relo
Kutime la besto, kiu savas sian mastron estas hundo. Sed en tiu mallonga novelo temas pri katino. Sed kontraŭ kio aŭ kiu ŝi savas sian mastrinon ? Se vi deziras scii pli, TEK invitas vin legi tiun tekston.	2 kaj 3	<i>Publikigita en januaro 2023, « Mécano » estas la verko de Mattia Filice, trajnokondukisto sur la reto de Saint-Lazare nun de preskaŭ 20 jaroj. Tiu multforma romano ofertas novan kaj poetan rigardon sur la ĉiutagaĵon de trajnokondukistoj. Ni bonŝancis renkonti ties aŭtoron.</i>
Ĉi tie oni proponas al vi matematikan ludeton por eltrovi la aĝon de iu laŭ originala kaj surpriza maniero	4 kaj 5	Trajnokondukisto sur la reto de Saint-Lazare, la rakontanto de « Mécano » elprenas multon el ties kreinto, la verkisto Mattia Filice, kiu ĉi tie subskribas sian unuan romanon. Li kondukas trajnojn sur la samaj linioj de preskaŭ 20 jaroj. Ni renkontis lin tute proksime de la Saint-Michel placo en Parizo en lia eldonejo. Mattia Filice ne antaŭdestiniĝis al fervoja kariero. Li unue laboris kiel projekciisto en la obskuraj salonoj. Sur stacidoma kajo li subite ekkomprenis : « Mi estis sur kajo, revenante el Barcelono, kaj mankis la kondukisto. Biletkontrolisto estis sendinta al mi ŝerceton « sufiĉas, ke vi mem kondukas la trajnon ! ». Mi ekkomprenis, ke la trajno estas ne nur maŝino, ke estas homo ene. Tio povas ŝajni evidenta... Sed ponto estis transirita : estas homa ĉeesto kaj tiu ĉeesto povus esti mi . Oni ne naskiĝas mekanikisto, oni iĝas tia. La unua parto de la libro estas dediĉita al la formado. Longa kaj malfacila. Por regi « mason de ĉirkaŭ kvarcent sesdek tunoj / kvarcent sesdek mil kilogramoj /ses mil fojoj la mia » .Tiu postula formado devas ebligi treni plensekurece varojn aŭ vojaĝantojn.
Kiel kutime nia unua Turlanda Luko de la jaro finiĝas per kukorecepto, kiun ni esperas. apetitveka al vi.	6 kaj 7	Tiu lernado profunde ŝanĝas tiun, kiu sekvas ĝin. Kiel
	8	



klarigas la aŭtoro : « *la formado transformis eĉ mian manieron rezoni. Nun pri ĉiu problemo mi funkcias iom en materiisma maniero. Mi serĉas la indikaĵojn, kaŭzojn, originojn por reveni al la fonto kaj poste kompreni la problemon, kiun mi estas travivanta kaj la diversajn alternativojn. Tion oni lernas dum la tuta formado tra la memorlibreto kaj la referenclibro.* » Tiu formado – vera elprovo por la rakontanto – evoluigas la penson, sed ankaŭ la kognajn respondojn. Gestoj iĝas aŭtomatismoj : « *post momento tio iĝas evidenta... Kiam oni preterrenkontas mekanikiston, kiu jam havas iom da sperto, li diras al vi, ke ne estas tre komplike konduki trajnon. Ĉar fakte la kondukado transformiĝis en aŭtomatismojn. Estas fine kiel bicikli !* »

Lacego kaj obstinema lukto kontraŭ endormiĝo, angoro pri eraro, kiu turmentas la rakontanton eĉ en liaj sonĝoj,

obsedo pri akcidento pri persono : Mattia Filice ne mildigas la realaĵon. La mekanikisto ankaŭ submetiĝas al la jugo de la tempo : « *Akurata estu vi / La unua el niaj ordonoj estas la akurateco / la brakhorloĝo nia unua kunulino / mekanikisto eklaboras je la 9a 23 / kaj lia unua trajno ekveturas je la 9a 42 / Dek minutojn por konsulti / la modifojn, la malrapidigojn / la trajnoslipojn kaj la haltejojn / Kvin por atingi la kondukistojn ekde la deĵorplanejo / kvar por remeti la trajnon en reduktitan uzon.* »

Enirante en la SNCF, la rakontanto renkontas tutan galerion de personoj. Gaël, Hidaya, Jacques, la viro, kiu murmuris timon al la oreloj, Kamal, Willy, Hervé. Ĉiuj tiuj vizaĝoj, ĉiuj tiuj destinoj, kiuj faras la entreprenon kaj, en la sinsekvo de la paĝoj, trudiĝas kiel frateco de rela socio. Ili povus esti multe pli nombraj : « *Komence estis pli da personoj,*

sed mi timis perdi la leganton. Mi devis iafoje resumi plurajn personojn en unu solan. Saint-Lazare sola havas inter 800 kaj 1000 kondukistojn kun la lokomotivejoj de Parizo, Achères kaj Mantes. Kaj sen konsidero de alioficigoj kaj emeritiĝoj. »

La rakontanto kreskas ĉe ilia kontakto. Profesie, humane, sed ankaŭ politike. Tiel la strikegoj de la aŭtumno 2007 estas grava momento de la historio. La rakontanto lernas tie la lukton. La batalon por si, sed ankaŭ por la aliaj. Mattia Filice klarigas : « Li malkovras la pasintajn batalojn kun siaj instruantoj, kiuj konis la entreprenon en la 1970aj kaj 1980aj jaroj.

Ekzistas formo de transdono. » Trans la rezulto de la mobilizado, estas la batalo per si mem, kiu gravas. La vera perdita batalo estas tiu, kiun oni ne partoprenis. La lukto estas ĉieesta en la libro. La socia alieneco, kiun priskribas Mattia Filice, ne ekzistas nur en la SNCF.

Cetere la aŭtoro neniam citas la kvar literojn de la nacia societo : « *Rilate la socialan flankon, la situacio malpliboniĝis. Sed tio estas iom ĝenerala. Ankaŭ pro tio mi deziris paroli nur pri la Entrepreno kun la ĉeflitero E, por ke ĉiu leganto povu identigi sin.* »

Kiam oni demandas lin, kiel li vidas sian metion hodiaŭ, la aŭtoro maltrankviliĝas : « *Estas nova fenomeno, ĝi estas tiu de eksigoj. Antaŭe ili ne ekzistis ĉe la trajnokondukistoj. Hodiaŭ homoj forlasas la entreprenon eĉ sen havi alian solvon.* »

Per « *Mécano* », Mattia Filice donas veran poetan dimension al la fervoja lingvo, farita per akronimoj, sigloj kaj teknikaj terminoj.

« *Komence mi hezitis. Sed miaj unuaj legantoj makovrante la unuajn paĝojn estis petantoj de tio. Kaj mi havis tutan skatolon de teknikaj vortoj. Mi diris al mi, ke mi devas doni al ili alian dimension, precipe atribuant al ili novan uzon, ĉefe por karakterizi emociojn.* » La formo de la romano miksas liberan versfaradon kaj prozon. Libereco, kiu permesas senhaltajn ritmoŝanĝojn.

Post jaroj da skribado Mattia Filice decidis elekti sian metion kiel temon. La rezulto de longa pripensado : *pli ol 15 jaroj necesis, por ke mi komprenu, ke mi povas fari mian metion literatura objekto. Mi sciis, ke estas multo por diri sed mi ne volis fari pamfleton aŭ ateston. Mi bezonis jarojn kaj jarojn de matureco...* »

Ĉe la apero de la libro la reagoj estis nombraj ĉe liaj kolegoj. « *Tio estis mia ĉefa zorgo kaj feliĉe la reagoj estas bonaj. Mi volis omaĝi al la fervojistoj kaj mi bezonis tiun aprobon. La fervojista mondo ofte estas objekto de antaŭjuĝoj, karikaturoj, mi sincere deziris proponi alian rigardon rilate al la metioj pri la relo. En la labormedio estas la paroleco. Tiam mi havis la okazon transskribi ĉiujn tiujn rakontojn, kiujn mi aŭdis dum mia kariero* ».

Same kiel Charles Bukowski kaj lia unua romano « *la poŝtisto* », Mattia filice eniras en literaturon pere de la laboro. Li sukcesas esprimi la tutan profundecon de sia metio kaj rigardas poetamaniere la fervojistan mondon. Sed precipe li ofertas al la legantoj anheligan romanon, kiu okazas en loko malpermesita al la simpla mortemulo : la kondukistejo.

La recenzon de Samuel DELZIANI eltiritan de la revuo La Vie du Rail de la 17a de februaro 2023 tradukis Jean-Mary Simonet

Mécano de Mattia Filice.
P.O.L. Editions. (2023)
Prezo : 22 Eŭroj.



JADA

de

Chantal Parduyns

Subite la pordo malfermiĝas al la blanka masko truita de du glaciaj putoj, kiujn ŝi tiom bone konas. Ŝia dio staras en la embrazuro. Lia akra rigardo trarigardas la kuirejon kaj rapide taksas ĝin. La pezaj nigraj nuboj, kiuj kaŭris sub la mebloj, subite amasiĝas kaj eliĝas el siaj kaŝejoj. Ili suprenflugas en dikaj minacaj volutoj kaj malheligas la senmakulan blankecon de la kuirejo. Ŝi ĵetas rigardon al la pordo kaj rapide mallevas la kapon al sia forno flustrante « Bonan vesperon, karulo ». Obtuzo grumblado respondas al ŝi.

Per la okulangulo ŝi serĉas la mankon, la eraron, la fajreron, kiu ekflamigos la koleron de ŝia dio kaj transformos la vesperon en inferon... Nenion ŝi trovas, nenion... Senespere ŝia rigardo fluas sur ĉiujn surfacojn de tiu kuirejo, kiun ili kune elektis antaŭ longaj monatoj, kiun ŝi opiniis bela, ĉar ĝi plaĉis al ŝia fianĉo. Sen eĉ pripensi, ŝi akceptis liajn raciajn argumentojn. Ŝi atente aŭskultis lin, admiris lian inteligentecon. Tiu kuirejo ne estis multekosta, oni povis aĉeti kelkajn ŝrankojn plie ; Blanko bone harmonias kun ĉio kaj ĉiam estos laŭmoda, eĉ post dudek jaroj. Kaj meze de tiuj ŝrankoj ŝi imagis eternon de lumaj feliĉoj. Nun ŝi estas la servema kaj obstinema sklavino de ĉiuj tiuj blankaj lakitaj pordoj. Ĉiutage la juna virino provas trakti ilin kun mildeco ; ĉiutage ili ribelas, klopodas altiri makulojn, perfide rezistas al ŝiaj tukviŝoj kovriĝante per spuroj, tuj kiam ŝi turnas la dorson. Ŝi neniam sukcesis mastri tiun lakitan kuirejon, kroma fiasko imputenda al ŝi.

Ŝiaj ŝtelrapidaj rigardoj trovas nenion ; ĉio estas en ordo, senmakula ; la tablo estas primitita, la manĝo preta.

Tamen ŝi certe forgesis ion... detalon ie en tiu luma vastaĵo, kiu frostas ŝin. Ŝi sentas pezi sur siaj ŝultroj la nigran kaj preman rigardon de sia edzo, kiu pacience atendas, donas al ŝi ŝancon por pliboniĝi. Ŝi jam scias, ke ŝi malsukcesos, kiel kutime, kaj li devos montri per la gesto kaj la voĉo ŝian evidentan pekon. Sed ŝi persistas ; ŝi panike cerbumas. Nervoze ŝi elgutigas la terpomojn, preskaŭ

maltenas la kaserolon, kiun ŝi reprenas lastsekunde, bruligas sian pojon pro vaporo.

Fine li antaŭeniras en la ĉambro, altablighas. Ŝi provas trankviliĝi : li donas al ŝi ŝancon por rebonigi la situacion. Ĉio ne estas perdita, nur necesas, ke ŝi estu perfekta por forviŝi la etan makulon, kiun li rimarkis.

Li metis la manojn ĉiufanken de sia manĝilaro. De kiel eble plej malproksime ŝi servas al li lian manĝon. Ŝi kontrolas la nutraĵojn samtempe, kiam ŝi demetas ilin en lian teleron. Ĉio bone ŝajnas. Li ne reagis, tio estas bona signo. Ŝi ne aŭdacas rigardi lin.

Malrapide ŝi fine servas sin. Ŝi ne malsatas, sed ŝi akompanos lian manĝon kiel bona edzino. Ŝi mense penas tion, kion ŝi metas en sian propran teleron : tro malmulte, li riproĉos al ŝi la fortomankon kaj la ciklan laĉiĝon ; tro multe, kaj li atentigos ŝin pri la kilogramo, kiun ŝi prenis de ilia geedziĝo.

Fine ŝi sidiĝas sur la randon de sia seĝo.

— Vi ankoraŭ forgesis ŝali la terpomojn, li grumblas.

— Ne, ne, mi bone atentis pri tio.

Ŝi rapidege respondis al tio, kion ŝi kredas esti demando – li ankoraŭ ne ekmanĝis. La nigraj nuboj ŝvelas kaj la tondro muĝas.

— Mi diras al vi, ke ili ne estas salitaj !

Li martelas ĉiun silabon. Per rapida brakgesto li forbalaas sian teleron, kiu flugas tra la kuirejo, antaŭ ol kunpremiĝi sur la muron. La juna virino violente eksaltas kaj falas surgrunden, kuntirante la seĝon en sia falo. Dolorfulmo klakas en ŝiaj vertebroj kaj ĉio malaperas en la blanka lumeto.

Kvietigite ŝi ŝrumpas sur la kahelaro : ŝi ne plu eltenis la atendon de tempesto. Ŝi scias, ke la pluvo de batoj ĉesos kaj ŝia kulpo estos lavita. Ŝia tuta korpo ardiĝas en la blankaj fulmoj de doloro.

Li estas for.

Ŝi restas falinta sur la malvarma kahelaro. Ŝi ne aŭdas sin ĝemi, ŝi ne sentas la spasmojn de siaj bombarditaj muskoloj. Malantaŭ siaj fermitaj

palpebroj, ŝi bedaŭras sian perditan perfektecon, larmoj ruliĝas, plenaj de salo.

Antaŭ kelkaj monatoj ŝi splendis sur la preĝeja placo, juna kaj bela ŝi volis kredi sin perfekta kaj ridante neis ĉiujn malvirtojn, kiujn ŝiaj gepatroj estis jam rimarkintaj. Ŝi estis nur stulta naivulino, ŝi nun sciis tion. Li amis ŝin, fidis al ŝi sed ŝi ne kapablis lin feliĉigi. Sub ŝia senmakula robo estis nur stulteco kaj malkompetenteco. Li pli valoris ol tio. Ŝi senrevigis lin.

La tagoj pasas. La vundoj cikatriĝas, la bluaĵoj forviŝiĝas, ŝajnas, ke la sangofluoj, kiuj angorigas ŝin, volas halti (ŝi estis graveda, sed ŝi perdis la bebon, ŝi scias tion) ; tamen estas tie la timo, kiu etendiĝas. Inter la momento, kiam ŝia dio foriras kaj tiu, kiam li revenas, la horoj fluas, unutonaj kaj solecaj. Ofte la juna virino buliĝas en senespera apatio kaj nur la timo de ŝia sinjoro kaj mastro pelas ŝin de taskoj al taskoj.

— Rigardu, kion mi trovis...

Li tenas en siaj manoj tutnigran katon, kies okuloj lumas kiel du briloj de polurita jado.

— Vi plendis esti sola, li estos en kompanio kun vi.

Li maltenas la katon en la kuirejo.

— Ĉu vi estas kontenta ? Ĉu li plaĉas al vi ?

Ŝi kredas, ke ŝi iam diris al li, ke ŝi preferas la hundojn sed li forgesis, li devas pensi pri tiom da aferoj, li havas tiom da respondecoj en sia laboro, pro siaj kolegoj, kiuj lasas lin prizorgi ĉion.

— Jes... Dankon.

La katino sidiĝas antaŭ la juna virino, gvasas ŝian konsenton. La besto estas katino, ŝi scias tion. Ili reciproke konas sin. Kiam la mastro estas for, la katino sidiĝas ĉiutage malantaŭ la kuirejan fenestron kaj atendas bovlon da lakto, pecon da viando.

— Nu, karesu lin ! Li ne ungeskrapas. Kiel timema vi estas !

La juna virino kliniĝas, iom gratas inter la du oreloj. La katino leviĝas kaj trankvile esploras la kuirejon.



— Jen !

La mastro ĵetas kelkajn monbiletojn sur la lavkuvon.

— Vi aĉetos tion, kio necesas.

— Jes... Dankon !

Li prenas la katon, observas lin.

— Ni vidu... Ha, ĝi estas ino, domaĝe ! Oni nomos ŝin Bjanka, kion vi pensas pri tio ?

— Jes, estas bone.

Kontenta li restariĝas kaj ridetas kun aroganta mieno antaŭ ol aldiri :

— Almenaŭ, tio estas originala !

Ŝi ne diras al li, ke ŝi jam baptis ŝin « Jada ».

Antaŭ ol iri enlitiĝi, la juna virino enfermas la katinon en la kuirejo. Kuŝante en la mallumo ŝi imagas kun timo la damaĝojn, kiujn ŝi malkovros matene, kaj ĉiujn nigrajn harojn, kiuj algluiĝos ĉien, kaj la krurspurojn sur la blanka kahelaro... Antaŭ la adopto de « Bjanka » ŝi jam ne sukcesis plenumi la postulojn de sia dio ; do nun, pro tiu besto, tio estos neebla tasko. Kaj nigra kato en domo alportas malfeliĉon. Tiu donaco estas plago.

Estas vere, ke ŝi plendis esti sola, fakte tio ne tute veras ; ŝi esprimis la deziron labori ekstere por renkonti homojn kaj kunporti iom da mono. Ŝi



ankoraŭ aŭdis lian respondon : « Sed tio estas neimagebla ! Vi ne havas diplomon, vi kapablas nenion fari, kian laboron vi trovos, viaopinie ? Fari purigadon ? Vi apenaŭ sukcesas fari vian dompurigadon. Kunporti monon hejmen... sed vi revas ! Vi gajnos malmultegon da mono, kiu ne sufiĉos por pagi la veturkoston. Kaj eble vi sukcesos gravediĝi, iam... »

Estas la sesa matene, la juna virino ellitiĝas senbrue kaj iras kontroli la kuirejon, antaŭ ol la vekilo sonoras. Ĉio glatas, la katino nenion malpurigis. Ŝi pretigas la kafon kaj la valizeton de sia mastro.

La juna virino kuŝas sur la divano kun la okuloj duone malfermitaj kaj mano en la nigra felo de Jada, kiu lekas ŝian vizaĝon salitan pro sekigitaj larmoj. Malgraŭ ĉiuj ŝiaj klopodoj, la kolero blovis

sur la domon kaj peze falis sur ŝian korpon.

Tiu katino estas miriga. Ŝi ekloĝis en la domo kiel silenta komplico. Tuj kiam la mastro estas tie, Bjanka respondas nur al li, rigardas nur lin kaj rezervas al li la ekskluzivan rajton karesi ŝin. Tuj kiam li turnas la dorson, ŝi iĝas « Jada ». Rapidege konstatis la juna virino, ke la katino neniam reagas, kiam ŝi nomas ŝin « Bjanka ». Kontraŭe ŝia unua nomo igas ŝin pintigi la orelojn, turni la kapon kaj veni ricevi karesojn.

— Vi estas nur oportunisto, sed tamen mi amas vin !

Jada levas la kapon, indignita. Ora fulmo trapasas ŝiajn verdajn okulojn, ŝiaj pupiloj ŝrumpas.

— Pardonu min, mi estas maljusta. Veras, ke vi kondutas kiel eble plej bone por igi lin bonhumora.

Veras, ke li ekkoleras malpli ofte, de kiam vi estas tie.

Jada rekuŝiĝas, kvieta.

La printempo alvenis hodiaŭ kaj kun ĝi la espero de nova gravedeco. La juna virino estas feliĉa, ŝi purigis la vitrojn, lavis la kurtenojn, freŝa vento gapvagas sur la blankaj pordoj de la ŝrankoj, la suno speguliĝas en ili. Jada karesas per siaj kusenetoj la malsekan kaj senmakulan kahelaron.

La vetero estis tro bela hodiaŭ, la fulmotondro minacas. Malgraŭ la apetitveka salato kaj la kvietiga ronronado, li ekkoleregas, furioza.

En angulo de la kuirejo, Jada kuntiriĝas, ŝiaj terure nigraj haroj hirtiĝas. Ŝi vidas la junan virinon

senpova kaj obeema, ŝi observas la mastron, kiu tempestas, ŝi sekvas lin per siaj verdaj okuloj, kie ŝajnas flui likva oro. Grandpaŝe la mastro ĉirkaŭiras la tablon kun levita brako kaj palega vizaĝo. Per siaj glaciaj okuloj li fikse rigardas la junan virinon. Tiam Jada fulmrapide eksaltas en liajn krurojn ; ŝia laŭtega bleko traboras la aeron kaj konsternas la viron. Malekvilibrigite li falas, lia kapo oblikve batas la fornotenilon, kiu eltiriĝas en terura krako. Obtuzo falbruo kaj la longa kaj densa silento ekestas en la glacia blankeco de la kuirejo.

Kvieta, Jada sidiĝas piede de la juna virino, levas la kapon ; ŝajnas, ke ŝi ridetas...

La mastro neniam plu levos la brakon sed Mariana ankoraŭ ne scias tion.

Tiun mallongan novelon legitan en la retejo short-

Akra matematika ekzerco

0					
<<	7	8	9	÷	%
C	4	5	6	×	1/x
CE	1	2	3	-	=
	0	+/-	,	+	

Amatoroj de matematikaj problemoj, faru tiun mirigan ludeton : multipliku vian piedan mezuron per 5.

Ekzemple : $43 \times 5 = 215$.

Poste aldonu 50 al la obtenita nombro (= 265).

Multipliku la tuton per 20 (5300) kaj aldonu 1023 (=6323)

Subtrahu vian naskiĝjaron (6323 – 1948)

Tiam vi obtenas nombron kun 4 ciferoj ; (en nia ekzemplo, 4375).

La 2 unuaj estas tiuj de via piedmezuro kaj la du sekvaj via aĝo !

Nekontestbla.

Artikolo de la revuo « Le Fil des ans » septembro- oktobro 2013 esperantigita de Jeannine Layseman.

Franda kuko sen gluteno

Ingrediencoj :

350 g da farunaj terpomoj

90 g da sukero

2 ovoj

1 citrono (nur la ŝelo)

120 g da glazuro por garnaĵo

1. Antaŭvarmigu la bakfornon je 180° C. Kovru per kuirpapero la 18 centimetran kukmuldilon (aŭ grasigu ĝin kaj surŝutetu per faruno)
2. Senŝeligu la terpomojn kaj boligu ilin. Kiam ili estas sufiĉe molaj por esti truitaj sen peno per forketo, premigu ilin kaj rezervu.
3. Dum tiu tempo, apartigu la ovoflavojn kaj la ovoblankojn en 2 bovlojn. En la unua, per elektra batilo, kirlu la ovoblankojn ĝis firmeco. Rezervu.
4. En la dua bovlo kirlu la ovoflavojn kun la sukero ĝis havi helflavan koloron kaj glatan paston. Almixu la terpoman kaĉon al tiu preparado. Almetu en ĝin citronŝelon. Bone miksu per elektra batilo ĝis obteni glatan kunteniĝon, kaj poste almixu la ovoblankojn per spatelo. Verŝu la tuton en la muldilon.
5. Kuiru en la bakforno ĉirkaŭ 40 minutojn, ĝis la kuko estas seka kaj orkolora. Kontrolu la kuiron per dentoskrapilo, kiu devas elkukiĝi pura.
6. Eltiru la kukon el la forno kaj lasu ĝin ripozi kelkajn minutojn antaŭ elmuldigi ĝin. Lasu tute malvarmiĝi antaŭ ol surŝuteti per glazuro.

Tiu kuko estas inspirita de Pellegrino Artusi, la patro de la itala kuirarto de la fino de la 19a jarcento. Liaj receptoj restas aktualaj.

Tiu recepto estas eltirita el la revuo Plantoj kaj sano N° 252 de januaro 2024 kaj esperantigita de Jeannine Layseman.

